NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 94.416.44.92
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

E-kursoj: Vendrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato

Normala jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj **BBK-konto: 22-1800155-0**

MAJO/JUNIO 2000





Bernardo Atxaga

Memorajoj de eŭska bovino

Ilustrado de la unua traduko
Aitor Arana

PREZENTADO DE E-LIBRO DE BERNARDO ATXAGA.

La pasintan 31-an de Marto, en la libro-vendejo "Axular" de la urbo Vitoria-Gasteiz, okazis prezentado de la eŭska versio de la fama romano "*Behi euskaldun baten memoriak*" ("Memorajoj de eŭska bovino"). La aŭtoro, Bernardo Atxaga, tre fama eŭska verkisto, kaj la tradukinko, Aitor Arana, ne movadano, sed elstara esperantisto kaj eŭska verkisto, ĉeestis la eventon

Diversaj eŭskaj esperantistoj estis invititaj, per letero, de la eldonejo mem kaj tio okazigis malmultnombran sed altkvalitan renkontiĝon de kelkaj el ili. Post komuna manĝo, interparolado daŭrigis ankoraŭ dum kelkaj horoj ĉe kafejo.

Substrekinda estas la ĉeesto de multaj ĵurnalistoj, kiuj plue demandis pri Esperanto al Atxaga kaj al Arana. En siaj respondoj, Bernardo Atxaga tre favore opiniis pri nia Internacia Lingvo.

. **Estimad@ <u>soci@:</u> Si a la izquieda de estas líneas encuentras una "X", es que . aun no has pagado tu cuota correspondiente al actual año 2000.**

REUNION DE FIN DE CURSO EN EL GRUPO
KURS-FINA KUNVENO

Antaŭ ol komenco de somerferiado kaj sekva disiĝo de ni ĉiuj, la venontan **vendredon 30an de junio**, ni kunvenos en la Grup-ejo. Tie vi havos la okazon renkonti malnovajn gekonatulojn kaj interparoli pri la lastaj okazintaĵoj, eĉ organizi vojaĝojn al someraj E-renkontiĝoj.

Kiel kutime, ankaŭ ni sidos ĉirkaŭ tablo por gustumi la manĝaĵojn alportitajn de la ĉeestantoj. Ni atendas vin ĉiujn ekde la **7,30 h.**

No lo olvides: el **viernes 30 de Junio** nos vamos a reunir en el Grupo con motivo del fin de curso y para despedirnos antes de las vacaciones de verano. Te esperamos a partir de las **7,30 h**. Como siempre, alrededor de una mesa, podremos hablar y degustar la comida aportada por cad@ un@.

HISPANA KONGRESO.

Ĝi okazis en San Sebastián de los Reyes, urbeto apud Madrid, de la 29ª de aprilo ĝis la 1ª de majo kaj ĝin partoprenis 3 bilbaoanoj.

Eble pro la dato, sufiĉe malkonvena, ne multaj esperantistoj ĉeestis; spite de tio, oni povas substreki ke plejparte estis gejunuloj, ke kelkaj programeroj estis vere altkvalitaj kaj ke estis unu el la hispanaj kongresoj, kie malpli da krokodilemuloj svarmis.

La venontan jaron la kongreso estos en San Javier (Murcia).

FABELA MARATONO.

Kiel la pasintan jaron, la urbo Guadalajara (Hispanio) organizis "Fabela Maratono"-n. En 1999 H.E.F. sendis la fabelon "Nuntempa Noao" en 18 lingvoj; kelkaj tradukoj estis faritaj de esperantistoj, inter ili la eŭska, far de nia amiko Patxi de la Hoz.

Tiun-ĉi jaron, laŭ peto de niaj madridaj gesamideanoj, ankaŭ **Patxi de la Hoz** tradukis eŭsken la legendon "Kial la kokoj ekkantas antaŭ ol aperas la suno?".

PRI LA EŬSKA, PERE DE ESPERANTO, EN LA RETO.

Dominik Cornice havas E-paĝon ĉe http://esperanto.online.fr/esperant61/defaultu.htm . Speciale interesaj por ni estas tiuj ĉi ligoj:

La Mistero kaj la Miraklo de la Eŭskera- D-ro Julius BALBIN, TEJO/KER, Seminario
http://esperanto.online.fr/esperant61/euxskeru.htm
Nomoj de monatoj en la eŭska. http://esperanto.online.fr/esperant61/nomojdeu.htm
Hiztegia/Vortaro, eŭska/esperanta. http://esperanto.online.fr/esperant61/euxskau0.htm
Vortaro/Hiztegia, esperanta/eŭska. http://esperanto.online.fr/esperant61/esperu0.htm

Mi ne kontrolis la kvaliton, he!

(Inf.:David Mediavilla Ezquibela)

NOVA TTT-PAĜO DE U.E.A.

La 15an de marto ekaperis nova bonveniga paĝo de UEA en la TTT (Tut-Tera Teksaĵo), pli alloga ol la antaŭa, kun informoj en 6 lingvoj: esperanta, angla, franca, germana, hispana kaj rusa. Interalie, eblas ankaŭ aliri la retbutikon de UEA. Memoru ke la adreso estas: http://www.uea.org



STATISTIKO.

En la aprila numero de "Esperanto", la oficiala revuo de uea, eblas legi statistikon pri ĝia membraro en 1999.

La landoj kun **pli da aligitaj membroj** (tiuj, kiuj apartenas al la landa asocio) estas Germanio (1079), Japanio (1062), Ĉinio (963), Italio (895) kaj Svedio (686). Hispanio alportis 329.

La landoj kun **pli da individuaj membroj** estas: Francio (686), Germanio (587), Brazilio (551), Japanio (409), Usono (389) kaj Nederlando (349). Hispanio alportis 190.

Entute, la nombro de individuaj membroj malkreskis en 1999 je 287, precipe en Francio (-208, post la montpeliera kongreso), Rusio (-58) kaj Rumanio (-44); kontraŭe, plej multe kreskis Brazilio (+40) kaj Svedio (+29).

Dume, ankaŭ malkreskis la nombro de aligitaj membroj, ĉefe en Francio (-239), Suda Koreio (-181) kaj Hungario (-116), dum plej kreskis en Polio (+90) kaj Germanio (+62).

Fine de 1999, estis entute 12.096 aligitaj membroj kaj 7.073 individuaj, do entute 19.169.

EŬROPAJ PARLAMENTANOJ KAJ ESPERANTO.

RetInfo disvastigis la liston de Germain Pirlot je 20.04.00., laŭ kiu 9 el la 64 hispanaj eŭroparlamentanoj estas favoraj al Esperanto. Jen la nomoj:

FERRER i CASALS Concepció , PPE/DE. (Eŭropa Popol-Partio/Eŭropaj Demokratoj)
GARRIGA POLLEDO Salvador , PPE/DE
GASÓLIBA i BÖHM Carles Alfred , ELDR (Eŭropaj Liberaluloj Demokrataj kaj Reformantaj)
GIL-ROBLES GIL-DELGADO José María ,PPE/DE
IZQUIERDO ROJO María , PSE (Europaj Socialistoj)
MEDINA ORTEGA Manuel , PSE
SAUQUILLO PÉREZ DEL ARCO Francisca , PSE
TERRÓN i CUSÍ Anna , PSE
ZABELL LUCAS Teresa , PPE/DE (Inf.: Darío Rodríguez)

DEBATO EN LA EŬROPA PARLAMENTO.

En la Eŭropa Parlamenta debato pri la Eŭropa Jaro de Lingvoj (12-04-2000), la eŭropa parlamentano Caudron (PSE-Socialisma Grupo)) menciis Esperanton. Li bedaŭris ke la Eŭropa Jaro de Lingvoj NE provos instrui Esperanton.

"Si je suis favorable au plurilinguisme, je regrette cependant que nous n'essayons pas de d'évelopper parallèlement l'enseignement de l'ésperanto. Cette langue qui a des racines européennes, est facile à apprendre, riche et nuancée. Comme langue auxiliare, elle peut constituer un moyen parmi d'autres de faciliter la communication entre tous les citoyens européens. C'est pourquoi je regrette que l'on n'en fasse pas mention dans cette proposition."

"Dum mi favoras plurlingvismon, mi tamen bedaŭras, ke ni ne klopodas paralele evoluigi la instruadon de Esperanto. Tiu lingvo, kiu havas eŭropajn radikojn, estas facile lernebla, riĉa kaj nuancoplena. Kiel helplingvo, ĝi povas esti unu rimedo inter aliaj por faciligi komunikadon inter ĉiuj civitanoj de Eŭropo. Pro tio mi bedaŭras, ke oni ne menciĝas ĝin en tiu ĉi propono".

"EUROPANTO".

En Belgio, Sidejo de la plejmultaj institucioj de Eŭropa Unio, oni komencis paroli ordinaran miksaĵon nomita "europanto", dialekto pripensita de Diego Marani, itala tradukisto de Eŭropa Unio-Konsilio en Bruselo.

La spertulo asertis que tiu nova "lingvo" miksiĝas esprimojn el kvin eŭropaj lingvoj -itala, franca, angla, finlanda kaj nederlanda-, kaj ĝi estas ĉiutage uzata de 20.000 Eŭrop-uniaj funkciuloj en la koridoroj de tiuj institucioj.

(Mario Miranda - Argentina E-instruisto)

Jen klasika teksto en Europanto. Europaj funkciuloj ne parolas ĉi tiun "lingvon". Tamen ili nepre pensas ke Esperanto egalas Europanto. Pro tio seriozaj homoj ne DEVAS proponi Esperanton kiel solvo de la lingva problemo.

Europanto bricopolitik de second Universele Diluvium de Europanto instituto van Bricotheologie eine inedito chapter des Bible habe gefund waar Jeovah eine secundo, heutendagse Diluvium declare de intende performe und nova instructiones aan eine moderne Noah give. Hier esse, op exclusiva, el texto des inedito chapter des Novissimo Testamento: Aquello dag Jehova dixit: "Dehaene! Wake up!" "Verdommerde! Qui esse!" pregunted Dehaene. "Esse Jehova speakeante! Uno poco van respecte, bitte! Ausculte! Presto Ich zal toda Belgica inondate, porque' esto country esse eine bordel! Subito kauffe eine ark und charge op alles wat in Belgica noch nicht gepourrierde est!".

(Diego Marani).